ISSN 2072-5825

# Espero Katolika



Numero 10-12/2011

Oktobro-Decembro 2011

**JARKOLEKTO 108 - N. 1083-1085 - Oktobro/Decembro 2011**
*Finpresita la 30.12.11* — Finito di stampare il 30.12.11

**Sur la kovrilo:** *La teko kun la korpo de Johano Nepomuk Neumann en la nacia pilgrimoko al li dediĉita en Filadelfio (Usono). Al ĉi tiu usona sanktulo el Bohemio estas dediĉita vasta artikolo* *(v. p. 65)*.

## ENHAVO

**"La Eklezio ne estas unu el multaj"**
El la **homilio** de Benedikto la 16-a en Berlino 63
**"Nur la amo estas kreipova"**
La jaro de sankta Maksimiliano Maria **Kolbe** 64
Elementa **matematiko** 64
Sankta Johano Nepomuk **Neumann** 65
La **Reĝino** de la sankta Rozario 68
**Interkomunio** 69
Sankta **Naskintino** de Dio 70
Kio ligas **Pollandon** kun la mondo 71
Malpleniĝis **preĝejoj**, pleniĝis malliberejoj 74
**Maksimo** 75
**Muziko**: la fiŝbarko 75
Por **enpensiĝo** 76
Kristnaska letero de **Jesuo** por vi 77
Preĝo al sankta **Pio la deka** 78
La **rifuĝejo** de la pekuloj 78
Koran gratulon al nia IKUE-frato **Max** 79
**Movade** 79

**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**
**Telefono kaj fakso: +39-06.39.63.81.29 - Elektronika poŝto:** <ikue@ikue.org>
**TTT-paĝoj:** http://www.ikue.org - http://www.esperokatolika.org * **Dissendolisto:** <ikue@yahoogroups.com>
**UEA-konto "ikue-v" * Banko:** "Unione internazionale cattolica esperantista" Roma, Italio
IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

*Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo* - Registrazione presso il Tribunale di Roma
n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

*Presejo* - Tipografia
ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

*Respondeca Direktoro* - Direttore responsabile
Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00012 GUIDONIA RM, Italio
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de **I.K.U.E.**
**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Vic-Prezidanto:** Sac. Attila Szép - **Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Ĝenerala Sekretario:** Carlo Sarandrea - **Kasisto, direktoro de la C.O.:** Antonio De Salvo - **Estraranoj:** Sac. Gabriel Anda, Sac. Lajos Kóbor, Bruno Masala, Sac. Stefano Hawkes-Teeples - **Kontorevizoroj:** Giovanni Daminelli, Pavol Petrík.

# LA EKLEZIO NE ESTAS UNU EL MULTAJ

## Parto el la Homilio de Benedikto la 16-a dum la Santa Meso en la olimpika Stadiono de Berlino la 22-an de septembro 2011

Iuj homoj restas ĉe rigardo al la Eklezio nur ĉe ĝia ekstera aspekto. Tial la Eklezio al ili vidiĝas kiel unu el multaj organizacioj interne demokratia socio kaj laŭ iliaj mezuriloj kaj leĝoj ili juĝas eĉ tiel nekunmezureblan grandecon, kiel estas la Eklezio. Se al tio ankoraŭ aldoniĝas tia doloriga realeco, ke en la Eklezio estas la fiŝoj bonaj kaj ankaŭ malbonaj, tritiko kaj ankaŭ trudherbo, kaj la rigardo fiksiĝas sur la negativaj flankoj, poste la granda kaj misterplena mistero de la Eklezio ne malfermiĝas.

Poste alvenas neniu ĝojo el aparteneco al vinbertrunko de la Eklezio. Disvastiĝas malkontenteco, ĉagreno, se iu ĉe siaj supraĵaj kaj eraraj imagoj pri la Eklezio ne vidas realigitajn proprajn „imagojn pri la eklezio“! Poste silentiĝas ankaŭ tiu ĝoja „Dankon al Dio, ke Li donis al mi la gracon kaj alvokis min en sian Eklezion“, kiel tion kantadis kun konvinko ĉiuj generacioj de la katolikoj.

La Sinjoro en sia parolo plu daŭrigas: „Restadu en mi kaj mi en vi. Kiel la branĉo ne povas de si mem doni frukton, se ĝi ne restas en la vinberarbo, tiel ankaŭ vi ne povas, se vi ne restas en mi, ĉar sen mi – ni povus ankaŭ traduki: ekster mi – vi povas nenion fari.“ (Joh 15,4-5)

### Aŭ, aŭ

Antaŭ tiun ĉi decidon estas starigita ĉiu el ni. Estas tio grava, diras al ni Sinjoro en sia parabolo: “Se iu ne restas en mi, tiu estas elĵetita, kiel branĉo, kaj sekiĝas; kaj oni ilin kolektas kaj ĵetas en fajron, kaj ili brulas.” (Joh 15,6) Al tio aldonas sankta Aŭgusteno: “La branĉojn atendas unu el tiuj du eblecoj, aŭ vinbertrunko, aŭ fajro; se ili ne estas en vinberarbo, ili estos en la fajro; por ke ili ne troviĝu en la fajro, ili restadu en la vinbertrunko.”




La decido ĉi tie postulata nin urĝe atentigas pri ekzistenciala signifo de nia vivdecido. La bildo de la vinbertrunko estas samtempe signo de espero kaj promeso. Mem Jesuo venis pere de enkorpiĝo en tiun ĉi mondon, por esti nia baza radiko. En ĉiu mizereco kaj sekegiĝo Li estas la fonto, kiu donacas akvon de la vivo, nutras nin kaj fortigas. Li prenas sur sin ĉiujn niajn kulpojn, angoron kaj suferon, purigas nin kaj fine transformigas nin je mistera bona vino. Iam en tiuj horoj de la mizerstato ni sentas nin esti kvazaŭ en premilo, kiel vinberoj, kiuj estas tute elpremitaj. Sed ni scias, ke lige kun Kristo ni fariĝos plenmatura vino. Eĉ tion malfacilan, penegan en nia vivo kapablas Dio transformadi. Grave estas, ke ni „restu“ sur vinbertrunko ĉe Kristo. (...) Resti en Kristo signifas resti ankaŭ en la Eklezio.

## "NUR LA AMO ESTAS KREIPOVA"

### La jaro de sankta Maksimiliano Maria Kolbe

Laŭ decido de Senato de Respubliko Pollando el la 21-a de oktobro 2010 estis la jaro 2011 proklamita La Jaro de la Sankta Maksimiliano Maria Kolbe. Jen la plej gravaj fragmentoj el ĝi.



La 14-an de aŭgusto 2011 pasos 70 jaroj ekde la martira morto de Sankta Maksimiliano Maria Kolbe, franciskano, kiu sendube apartenas al la plej eminentaj personoj – la plej gravaj poloj de la dudeka jarcento.

Sankta Maksimiliano Maria Kolbe estas simbolo de la viktimoj de naziismo kaj „la patrono por malfacila tempo" – kiel diris pri li Papo Johano Paŭlo la Dua. Li estas ankaŭ la simbolo de malfacilaj decidoj estiĝantaj en la vivo de ĉiu homo.

La Sankta Maksimiliano Kolbe, naskiĝinta la 8-an de januaro 1894 en la urbo Zduńska Wola, pereis martire en la germana koncentrejo KL Auschwitz, en kiu post transporto fine de majo 1941 li ricevis la koncentrejan numeron 16670. En lastaj tagoj de julio, post forfuĝo de unu el la malliberuloj, li oferdonis sian vivon anstataŭ al li nekonata Franciszek Gajowniczek, kondamnito je mortopuno per malsatigo. Fratulo Kolbe travivis en la mortobunkro du semajnojn. Li mortis la 14-an de aŭgusto 1941.

Omaĝante kaj estimante ĉi tiun grandan personulon, la Senato de Respubliko Pollando deklaras la jaron 2011 kiel la Jaron de la Sanktulo Maksimiliano Maria Kolbe.

La Senato faras tion por la honorigo de la vivo kaj la morala sinteno de ĉi tiu eminenta Polo kaj sacerdoto, defendanto de la homa digno, la modelo de virtoj, morala aŭtoritato, heroo kun la heroeca kuraĝo, edukisto, socia aganto kaj ankaŭ la monda civitano, kiu je la nomo de solidareco anstataŭ la alia homo suferegis kaj pereis. Lia socia sinteno kaj sinofero havas la specialan signifon por la ĉiam renaskiĝanta civitana socio de Pola Respubliko.

*El Nova et Vetera, n-ro 6/02/11 tradukis*

*Stanisław Śmigielski*

***Sankta Maksimiliano Maria Kolbe estas unu el la ĉielaj protektantoj de I K U E.***

***Nia Sankta Maksimiliano, propetu por ni!***

## ELEMENTA MATEMATIKO

La celkonscia instruistino skribis sur la tabulon specialan ekvacion: 1+1+1=1 kaj ŝi demandis la infanojn: "Kion vi opinias, ĉu tio estas vero?" La infanoj diris, ke ne. "Kaj vidu, tion instruas la katolika eklezio, kiam ĝi diras, ke la tri personoj estas unu Dio."

Tuj ekstaris unu lernantino, forviŝis ĉiujn signojn +, kaj anstataŭis ilin tiel:

1x1x1=1 kaj aldiris: "En Dio oni nenion sumigas, sed obligas!"

# SANKTA JOHANO NEPOMUK NEUMANN

En la historio de homaj gentoj troviĝas de tempo al tempo personoj, kies vivo kaj signifo ege superas tiujn de iliaj samtempuloj. Inter ili specialan rolon ludas sanktuloj kun mesaĝoj fontintaj de amo al Dio kaj heroa klopodo je spirita kampo. Nunjare oni solenas gravan naskiĝjubileon de iama amerika episkopo de Philadelphia (Filadelfio), kiu ja devenas el nia lando Ĉeĥio, sed tamen en sia patrujo malmulte konata. Lia nomo estas sankta Johano Nepomuk Neumannn. Li naskiĝis en sudbohemia urbo Prachatice la 28-an de marto 1811 en familio de germana patro kaj de ĉeĥa patrino kiel la tria el ses infanoj. Bapto okazis en impona urba gotika kirko de sankta Jakobo, kien li poste ofte iradis kun sia panjo, eĉ kie li ankaŭ me soservadis. La knabo kreskis en bona kristana familia medio, kie lin influis precipe la pia kaj saĝa patrino. Liaj plej ŝatataj amikoj estis jam en la infanaĝo libroj, ĉiam li strebis utile plenigi sian liberan tempon.



*S-ta Jan Nepomuk Neumann*

Por lerni en dujara eklezia gimnazio foriris Johano al dioceza urbo České Budějovice, kie li poste aliĝis al studado de teologio. El 80 ĝis 90 kandidatoj oni akceptis nur dudek kaj inter ili eĉ nian junulon Neumann el Prachatice. Certe sian rolon ludis en tio eĉ preĝoj de la patrino, kies sopiro estis pastriĝo de sia filo. En seminario lin forte influis leteroj de sankta apostolo Paŭlo. Lia plaĉa intereso restis legado de libroj kaj nun eĉ de misiaj raportoj. En la studenta animo ekkreskis subite ideo post sacerdotiĝo elvojaĝi en nordan Amerikon kaj tiu decido de la unua momento restis jam firma. Pro studado de fremdaj lingvoj poste Johano foriris al Praga universitato, sed laŭ liaj propraj vortoj restis tie elrevigita pro mizera nivelo de teologia instruado kaj tial li preferis reveni al Budějovice. Kiam nia estonta sanktulo finis teologian klerigon kaj estus sekvonta pastra ordino, tiam ekestis problemo. Pro troa abundo de sacerdotoj la dioceza episkopo decidis prokrasti donon de la sakramento al parto de la seminarianoj, inter tiuj ankaŭ al Johano. Solvo de la situacio estis por li tute klara: elmigri en Amerikon kaj fariĝi tie misiisto. Post venko de multaj obstakloj fine malankris lia ŝipo la 20-an de aprilo 1836 kaj direktis sin trans Atlantiko al Nova Mondo.

Fine post aventura perŝipa transporto de Eŭropo akiris Johano Neumann en februaro 1836 sopiritan bordon de Usono. Jam post kelkaj monatoj li ricevis en Novjorko senprobleme sakramenton de sacerdoteco. De tie li foriris al Williamsville en regiono de Niagara-akvofaloj. Tie li finkonstruigis lokan kirkon, establis lernejon kaj zorgis pri paroĥo, kies areo etendiĝis sur preskaŭ 1500 km². Precipe li animzorgis pri germanaj enmigrintoj dislokigitaj en tute diversaj ejoj. Post kvar jaroj de elĉerpiga senlaca laboro la paroĥestro kolapsis, do tial oni translokigis lin en monaĥejon de redemptoristoj en Pittsburgh. Tie li interkonatiĝis kun riĉeco de iliaj spiritualismo kaj agado, admiris eĉ pensojn de la ordena fondinto sankta Alfonso. En la monaĥejo Johano fariĝis do novico kaj post fino de postulata periodo oni akceptis lin en la jaro 1842 en Baltimore kiel anon de la kongregacio. En la jaro 1844 li fariĝis monaĥejestro, post

pluaj tri jaroj ordena provincialo. Johano senĉese vojaĝis, fondadis ĉiam lernejojn eĉ kirkojn, poste en la jaro 1851 oni nomumis lin paroĥestro en Baltimore, kie ekvivis multe da novloĝantoj. Li verkis kaj eldonis du katekismojn eĉ biblian historion.

Kiam en la jaro 1852 mortis episkopo en Filadelfio, redemptorista pastro Johano Neumann estis proponita kiel kandidato por tiu seĝo. Unue li ne volis akcepti la kandidatiĝon, sed fine jesis. Precize en lia naskiĝtago la 28-an de marto de tiu jaro oni ordinis nian sanktulon je episkopo. Dum ok jaroj de sia funkcio li fondis preskaŭ 100 lernejojn kaj pli ol 80 kirkojn, reformis porpastran seminarion kaj forte subtenadis ankaŭ aliajn ekleziajn ordenojn en la diocezo. Multe da tempo li dediĉis al spirite neglektitaj paroĥanoj, precipe enmigrintoj devenintaj el diversaj landoj kaj kulturoj dissemitaj tra la vasta teritorio, zorgis pri katolika edukado de infanoj eĉ junularo, pri malriĉuloj.

Post du jaroj vojaĝis la episkopo de Filadelfio en Romon al kongregacio, kie lin akceptis persone la papo. Revenante li haltis en sia naskiĝurbo Prachatice, kie la loĝantoj preparis al li solenan bonvenigon, eĉ se Johano strebis la alvenon sekretigi. Post la reveno al Usono li plue dediĉis sin al sia laboro en la diocezo, sed la 5-an de januaro 1860 kolapsis surstrate kaj mortis en la aĝo de neĝisvivitaj 49 jaroj. Lia korpo ne povis plu elteni tian eksterordinaran ŝarĝon, kiun oni de ĝi postulis pro senĉesa agado. La sankta viro neniam ripozis, li tute ne sciis ĉe si mem, kion signifas mallabori. Jes, en malproksima usona urbo Filadelfio mortis tiam eksterordinara ekleziulo deveninta el Bohemio…

Renomo pri heroa vivo eĉ spiritaj kvalitoj de la episkopo Johano Nepomuk Neumann rapide disvastiĝis en katolika medio tra la tuta kontinento. Tio direktis al lia beatigo en la jaro 1963 kaj sekve al kanonizo la 19-an de junio 1977, ambaŭ fare de papo Paŭlo la VI-a en Romo. Filo de nia ĉeĥa lando fariĝis la unua sanktulo de norda Ameriko! Ĉu tio estas eksterordinara honoro eĉ por ni, liaj sampatrujanoj? Tamen kiom da loĝantoj de Ĉeĥio, des pli kiom da katolikoj ĉe ni scias almenaŭ ion pri ĉi tiu granda ekleziulo?

Sed nun ni rigardu ankoraŭ je pluaj interesaj eventoj, kiuj ligas sin al nia sanktulo, liaj familio kaj naskiĝurbo. La fratino Johana fariĝis la unua novicino de la Kongregacio de sankta Karolo Boromeo en Prago, kiun en tiu tempo oni nove algvidis el franca urbo Nancy. Poste ŝi – jam fratulino Karolina – aktivis kiel superulino de ordena malsanulejo en České Budějovice. En sia naskiĝdomo de Prachatice ŝi mem fondis monaĥinejon „Neumanneum“. La plej juna fratino Aloisia post zorgado pri hejmo de sia maljuniĝinta patro same aniĝis al tiu kongregacio. Danke al interkonsento de la gefratoj transprenis familian domon



*Kardinalo Rigali el Filadelfio en Prachatice*




*Soleno de ducentjara datreveno de la naskiĝo de sankta Johano Nepomuk Neumann en Prachatice la 18-an de junio 2011*

post morto de iliaj gepatroj la citita kongregacio por konstitui tie urban hospitalon. Tradicio de sanzorga establaĵo restis sur tiu loko ĝis nuna tempo. La origina domo estis poste alikonstruita, en la naskiĝĉambro de nia sanktulo instalis fratulinoj kapelon. Malgranda malsanulejo estis vastigita je najbaraj domoj kaj modernigita, de la jaro 2005 funkcias tie ordena hospico portanta nomon de sankta Johano Nepomuk Neumann, ununura tiu establaĵo en suda Bohemio.

En la pasinta jaro ni solenis 150-jaran jubileon de la naskiĝo de sankta Johano por la ĉielo, t.e. ni memorigis gravan datrevenon de lia morto. Ĉi-jare oni organizis solenaĵojn okaze de lia naskiĝo sur ĉi tiu tero antaŭ du jarcentoj. En Ĉeĥio precipe en la diocezo de České Budějovice kaj kompreneble la centro de intereso fariĝis la naskiĝurbo de la sanktulo Prachatice. Tie okazis la 18-an de junio granda pilgrimo, kies ĉefa gasto estis kardinalo Justin Rigali, ĉefepiskopo de usona diocezo Filadelfio, sekvanto de Johano Nepomuk Neumann sur tiea episkopa seĝo. Sankta Patro Benedikto la XVI-a komisiis lin kiel papan legaton por ĉi tiu okazo. Negranda sudbohemia urbo ĉe rando de la montaro Šumava gastigis en tiu tago amason da pilgrimantoj de Ĉeĥio kaj Germanio, inter ili eĉ multajn episkopojn, pastrojn, monaĥinojn ktp. Riĉa spirita programo kulminis sur historia urba placo, kie prezidis sanktan meson kardinalo Rigali, kies anglalingvan homilion precipe pri la vivo kaj heredo de la sankta Johano oni tradukis tuj en la ĉeĥan. Poste daŭrigis la programo en la paroĥa kirko de sankta Jakobo, krome fratulinoj de sankta Karolo Boromeo malfermis por vizito de pilgrimantoj la naskiĝdomon de la sanktulo, kie oni povis eniri belan kapelon, parte eĉ la hospicon kaj promeni en ĝia ĝardeno apud restaĵoj de mezepokaj urbaj muregoj. Ankaŭ por la usona kardinalo estis tiuj travivaĵoj en pilgrima medio vere riĉigaj, kiel li poste tion mem esprimis. Ties vojaĝo al eŭropa lulilo de lia antaŭulo estis certe por li persone tre grava eĉ pro tio, ke li post kelkaj semajnoj rezignis je la episkopa funkcio pro alta aĝo.

Jen estas ankoraŭ necese enpensiĝi iom pri heredo de la sankta Johano Nepomuk Neumann, kiun li postlasis per siaj vivo kaj mirinda verko al pluaj generacioj, do tiel ankaŭ al ni. Unue ni ĉeĥoj povas esti fieraj, ke li devenis el nia patrujo, el bohemia urbo Prachatice. Lia patrino estis ĉeĥino, la patro venis el Germanio de regiono apud la rivero Main, do de nacia vidpunkto Johano apartenas iel al ambaŭ niaj najbaraj landoj. Pro tio ankaŭ germanaj katolikoj havas motivon por honori lin kiel la propran sanktulon. Sed precipe nia filadelfia episkopo fariĝis kiel la unua kanonizita persono de Norda Ameriko patrono de Usono! Lia korpo de misiisto

estas entombigita tie, kien lin sendis el nia patrujo la Sinjoro, en la lando, al kiu sankta Johano oferis sian vivon. Multaj momentoj de lia pilgrimo povas montri ankaŭ al ni, homoj vivantaj en la 21-a jarcento, direkton por niaj propraj vojoj.

Je la fino mi envicigas preĝon de la sanktulo en la tago de lia primico:

„Mia Jesuo, vi elverŝis sur min plenecon de viaj gracoj. Vi igis min pastro kaj donis al mi eblon portadi vin je ofero al Dio. Mi volas al vi preĝi, por ke vi min konsekru kaj pardonu al ĉiuj vivantoj eĉ mortintoj, por ke ni iam povu esti, la plej amata Dio, ĉiuj ĉe vi.

Sankta Johano Nepomuk Neumann, propetu nin!

*Inĝ. Jan Kalný*

# LA REĜINO DE LA SANKTA ROZARIO

Se ni diras la vorton rozario, ni povas imagi ĝian formon kaj enhavon. La formo, ĝi estas la ĉeneto plena de globetoj kun kruceto je la fino, la enhavo estas la senco de la rozario. Kion la rozario enhavas. Kian rolon ĝi ludas en la preĝo kaj en la spirita vivo de la kristanoj. Kaj la Virgulino Maria estas la reĝino de tiu ĉi belega enhavo. La traktaĵo pri la rozario memkompreneble meritus vicon kaj vicon da konsideroj, meditoj kaj analizoj. Sed hodiaŭ ni nur mallonge enpensiĝu super la rozaria preĝo.



La rozario estas la preĝo malfacila. Iu eble dirus facila, ĉar daŭre estas ripetataj la samaj preĝoj al la Virgulino Maria kaj al Dio. Sed vivi kaj enpenetri sin en la enhavon de ĉiu mistero ne estas facila. Jes, dum la razario nia buŝo ripetas konstante la samajn petojn, alvokojn kaj pensaĵojn, sed de tio, kion diras nia buŝo, devas esti starigita meditado pri la apartaj misteroj. La rozaria preĝo estas la preĝo mistera, ĉar ĝi estas la preĝo, kiu rilatas vicon da misteroj el la vivo de la Virgulino Maria. Ĉar ili eliras el ŝia vivo, Ŝi estas la reĝino ne nur de tiuj misteroj, sed ankaŭ de tiu preĝo. La rozaria preĝo ne instruas nin nur tion, kion ni diras, tion ni kapablas ĉiuj tre bone, kiuj la rozarion preĝas. La rozaria preĝo nin instruas kontempli, mediti kaj eĉ, kiu bone la rozarion preĝas, en tiujn misterojn eniĝi. La rozaria preĝo ne estas nur simpla ripetado, stereotipa "gurdada" ripetado de io, sed ĝi estas la vojo al Iu kaj en ion. Post ŝtupoj de la apartaj Saluton Maria ni aliras al Dio. En la rozario estas la apartaj Saluton Maria ŝtupetoj sur ŝtuparo al kompreno de la misteroj, pri kiuj ni meditas. La rozaria preĝo estas la preĝo, kiu estas por la Virgulino Maria precipe agrabla. Ne nur pro tio, ke en ĝi Ŝi estas honorata, sed antaŭ ĉio tial, ke ĝi la kristanon gvidas al Dio.

Ne estas vero, kiel oni ofte riproĉas al la rozaria preĝo, ke ĝi koncentriĝas al persono de la Virgulino Maria, tio estas miopa objĵeto. La homo, kiu bone komprenas la rozarian preĝon vidas la Virgulinon Maria kiel perantinon al tiuj misteroj, kiujn en ŝian vivon enmetis Dio. Estas necese pere de la Virgulino Maria dum la rozaria preĝo eniradi en la misterojn, kiuj eliras el Dio. Ni preĝu la rozarion tiusence kaj tiustile. Ni prenu en la manon helpilon, kiun ni povas aĉeti. Ni diru perbuŝe la vortojn, kiujn ni kapablas ellerni. Ni turnu la atenton al la Virgulino Maria, kiun ni povas peti kaj ni serĉu en la rozaria preĝo Dion, kiun ni povas ekkonadi. *Max Kašparů*

# INTERKOMUNIO

*La artikolo sub tiu ĉi titolo aperis en la gazeto Vojo – Vero – Vivo de Internacia Katolika Informejo n-ro 1/1971 aperanta tiam en Nederlando, kiel reago al la Sankta Meso okazinta kadre de la Ekumena E-Kongreso 1970 en Klagenfurt, Aŭstrio. Ĉar la problemo de la interkomunio estas plu aktuala, por klarigi kaŭzon de la problemo, ni publikigas tiun ĉi artikolon.*

Temas pri sankta afero!

Per la Sankta Meso estas konfiditaj al ni la veraj kaj plej sanktaj Korpo kaj Sango de nia Sinjoro Jesuo Kristo, pro tio ke la Meso estas la ĉiam renovigata Ofero de nia Savinto.

En la Sankta Komunio ni ricevas tiujn plej sanktajn Korpon kaj Sangon, la tutan Kriston. Kiel nia Dio, Li estas tie adorinda kaj adorenda!

Tial laŭ kristana kutimo ni ripetas antaŭ la Sankta Hostio post la konsekro la vortojn de la apostolo Tomo: „Mia Sinjoro kaj mia Dio" (Joh 20,28).

Tiel ni preĝas, ĉar tiel ni kredas! Tiel ni kredas, ĉar tiel estas!

Jen la fundamento de nia adorado.

Pro tio, ke en la orientaj ortodoksaj eklezioj regas la sama kredo, agas veraj sacerdotoj, konsekrante dum Sankta Meso, tial ankaŭ ni tie adoras en la Sankta Eŭkaristio la saman sanktan Misteron de Dio. Same tie Jesuo Kristo, fariĝinte homo, mortinta kaj resurektinta, laŭ la Korpo kaj Sango ĉeestas en la Sankta Meso.

En la Vespermanĝo de la protestantaj kristanoj tio ne okazas. La protestantaj pastroj ne estas sacerdotoj; ili ne konsekras kaj ankaŭ ne intencas fari tion!

Jes, ili deziras kunveni memorigante la sanktan Vespermanĝon de nia komuna Sinjoro. Certe ili sincere deziras soleni la sanktan ĉeeston de nia Savanto; sed ne okazas la ofero de Kristo. Ne okazas ŝanĝiĝo de pano kaj vino, nek ili fariĝas en konsekro Korpo kaj Sango de nia Sinjoro.

Pano kaj vino en la protestanta Vespermanĝo restas pano kaj vino. Tiuj estas uzataj en la liturgio nur por esprimi tion, kio okazis en la sankta Vespermanĝo. Tiel la partoprenantoj spirite sin unuigas kun Kristo.

Jen la granda, esenca diferenco inter la katolika kaj la protestanta liturgioj.

Se ni ekumene kontaktas kun aliaj kristanoj, ni volas esprimi nian sinceran respekton antaŭ ilia kredo kaj ilia liturgio, same kiel ni agnoskas, ke ili sincere respektas nian kredon kaj nian liturgion.

Vere ni ambaŭ deziras fariĝi tute unu komuno, unu eklezio, unu kristanismo. Kristo mem tion deziras multe pli. Por tio Li akceptis eĉ la morton.

Sekve nia deziro al interkomunio: ne nur al komuna ĉeesto en la Sankta Meso, sed al vere komuna partopreno en la Sankta Meso kaj en tiu al komuna partopreno en la Sankta Komunio.

Por tio tamen ne sufiĉas nia deziro kaj niaj preĝoj!

Por tiu partopreno en la Sankta Meso kaj por komuna ricevo de la Sankta Komunio unualoke necesas unueco en la kredo!

Nur kredante oni ja povas adori la Sanktan Sakramenton.

Ĉu estas signo de nia respekto antaŭ aliaj kristanoj, se ni proponas al ili adori kiel veran Dion tion, kio laŭ ilia kredo estas nur pano kaj vino? Tio estus ŝajna ekumeno! Ĉu ni povas proponi, ke ili ricevu la Sanktan Komunion, kaj ili faras tion, akceptante, ke ĝi estas nur la pano kaj la vino?

Jen do la tragika diseco inter ni ambaŭ: ni kontraŭe kredas. Sendepende de

nia kaj ilia kredo ni scias, ke fariĝas en la konsekro kaj restas en la tabernaklo la vere sankta Korpo de Kristo!

Tial laŭ propra, persona konvinko iu protestanta kristano povus partopreni en nia Sankta Meso kaj ricevi la Sanktan Komunion agnoskante la katolikan kredon pri tiu Mistero!

Tiel en dukonfesia nupta soleno kun la katolika nuptanto same la kristana nuptanto povas, se li deziras tion, komunii, se li per tio agnoskas sian komunan kredon!

Same la katoliko povus eble foje inviti sian kristanan fraton al tiu partopreno kaj al tiu ricevo, nome supoze, ke tiu pretas konfesi sian kredon en tiu Mistero!

Nia invito ja ne estas vere amika kristana gesto, se ni devas supozi, ke nia protestanta amiko ne tiele kredas, sed kontraŭe tion opinias neakceptebla!

Certe tragika diseco!

Sed evitende estas, ke ni faru kvazaŭ tiu diseco ne estus reala. Tio povus detrui ilian kaj nian konvinkojn! Kaj ĝuste tio estas la plej kontraŭekumena agado!

## SANKTA NASKINTINO DE DIO

La ceterajn titolojn, kiujn ni al la Virgulino Maria atribuas, kiel Patrino de la Savinto, Patrino de la Kreinto, tion oni povas resumi per unu titolo Sankta Naskintino de Dio.

Ununura tago en la vivo de la virino ŝin patrinigos. Ĝi estas la tago de la akuŝo. Ĉiu virino donacas la vivon el la propra vivo al sia infano. Per tio estas ĉiuj virinoj en la mondo al si egalaj.

Ĉu la Virgulino Maria diferenciĝis en io? Se ni kredas kaj konjektas, ke Ŝi koncipis sian Filon Jesuon en la aĝo de 14 aŭ 15 jaroj kiel tre juna knabino, la nuntempa psikologo pri la 15-jara knabino dirus, ke ŝi estas psiko-sociale nematura por la patrineco. Ĉe la Virgulino Maria estis aliel. Ŝi vivis en alia tempo, en alia medio, en alia kulturo ol la nuntempaj dekkvinjaraj knabinoj, sed ŝi havis, diference de la hodiaŭaj knabinoj, kaj en tio Ŝi diferenciĝas, alian vivsenson, alian edukon kaj alian sintenon al la valorecoj. Por Ŝi la alvoko de Dio estis misio. Tiel same naski Dian Filon estis por Ŝi la misio. Kaj Ŝi estis tiel matura, ke tiun ĉi respondecon, spite de ĉiuj malfacilaĵoj kun tio ligitaj, Ŝi sukcesis akcepti.

Ŝia „fiat“ – fariĝu ne estis respondo senpripensa, nematura kaj por la vivo nepreparita knabino. Tian la Dia saĝeco ne elektus por esti la patrino de sia Vorto. Ŝia fariĝu estis la pruvo, ke en la valorecoj, kiuj eliĝas el Dio kaj estas sencoplenaj, Ŝi estis onidirite hejme. Ŝi konceptis ilin. Eĉ se Ŝi ilin ne komprenis, Ŝi sciis, ke se ili estas de Dio, ili havas sencon. Tio estis la dua, per kio Ŝi diferenciĝis de la nuntempaj niaj knabinoj.


Multaj el ili vidas la sencon eĉ ne en tio la homa, natureca, des malpli en tio Dia, supernatura. Kaj trie, en kio diferenciĝis tiama dekkvinjaraĝa Maria de multaj nuntempaj dekkvinjaraj knabinoj, estas ankaŭ en tio, ke Ŝi, Maria, estis kompleza „komplikigi“ sian vivon. La nuntempa juna knabino faras ĉion por tio, por ke ŝia vivo estu leŭeble la plej simpla, ke ĝi havu plej malmulte da obstakloj. Por trairi senobstakle la vivon, tiucele estas la nuntempa juna virino kapabla facilanime forigi sian koncipitan infanon. Ĝi ĝenus ŝin. Ŝi estas volema daŭre rezigni pri sia patrineco, por ne komplikigi sian vivon. Ŝi estas volema fari ĉion por tio, eĉ se ŝi la infanojn havas, por ke ili estu por ŝi laŭeble la plej malgranda ĝenaĵo.

La Virgulino Maria estis tiel saĝa, ke Ŝi sciis, ke per la nasko de la Dia Filo Ŝi komplikigos sian surteran pilgrimadon. Tamen Ŝi tion faris.

*D-ro Max Kašparů*

# KIO LIGAS POLLANDON KUN LA MONDO

Poloj plej frue ame kaj amike rilatis al ĉeĥoj, kiuj ĉe la komenco de la polŝtata historia ekzisto donis al poloj du elstarajn personojn, nome reĝidinon Doubravka (965) kaj sanktan Adalberton (Vojtěch 992).



*S-ta Adalberto sur monumento de s-ta Venceslao en Prago sur Placo de S-ta Venceslao*

La unua alportis kristanismon, la dua venis por misiadi inter prusoj. Post nelonga tempo li estis mortigita de paganoj (997). La reĝo Boleslavo elaĉetis lian korpon kaj sur lia tombo en Gniezno fondis la unuan sendependan arkiepiskopejon. Tio en la tiamaj tempoj havis esencan signifon por Polujo. Reciproke poloj donis al ĉehoj sanktan Johanon Sarkander, martirigitan en Olomouc (1620) pro rifuzo de malsekretigo de la konfessekreto. Same honorata en Pollando estas la ĉeha martiro Johano Nepomuceno mortigita en Prago (1393), kies ĉevoja statuo apartenas al la plej oftaj.

Al Hungario poloj estas dankemaj por du sanktaj reĝinoj, nome pro Kinga



*La reĝino sankta Kinga en Wislica, Polujo*

(+1292) kaj Hedviga (+1399). Ambaŭ reliefis polan religiemon, kion poloj reciprokas per vera amo. Sufiĉas viziti klostron en Stary Sącz, kie kuŝas restaĵoj de Kinga kaj kastelon Wawel en Krakovo, kie estas tombo de Hedviga, por konvinkiĝi pri la dankemo de gepoloj. Ankaŭ klostro sur la Hela Monto en Częstochowa ofte gastigas hungarojn, kiuj volonte tien pilgrimas.



*Tomba monumento de la reĝino s-ta Hedviga en la katedralo de Wawel, Krakovo, Polujo*

Kontraŭ germanoj poloj preskaŭ konstante sindefende batalis, sed ankaŭ en tiuj rilatoj estadis helaj momentoj. Al tiuj oni devas alkalkuli amikecon inter reĝoj Boleslavo la Brava kaj Otto la Tria el la jaro 1000. Germanujo ankaŭ donis al poloj bonan misiiston – sanktan Brunon el Kverfurt (+1009) kaj princinon sanktan Hedvigan (+1243), kiu post morto de sia edzo monakiniĝis en Trzebnica apud Vroclavo, kie ŝi fondis klostron. Fine, dum la lasta mondmilito en la koncentrejo de Auschwitz-Birkenaŭ (Oświęcim) estis martirigita fare de ekstremmaldekstraj nazigermanoj la sankta Maksimiliano Maria Kolbe la 16-an de aŭgusto 1941. La martiro plejverŝajne kunigos la tre ofte batalantajn unu kontraŭ la alia naciojn.

Kun Ruslando ligis polojn ankaŭ batalkampoj. Tutan Siberion kovras multaj ostoj de polaj naciaj herooj, sed ankaŭ en Pollando ne mankas tomboj de rusaj soldatoj mortigitaj dum bataloj sur la pola



*Reĝido sankta Kazimiro, Krakovo, Polujo*



*Pola reĝo Jahano Sobieski*

tero, precipe dum la lasta Dua Mondmilito, kiam kune kun polaj soldatoj ili sinofere kontraŭstaris nazihitleran invadon kaj forŝovante la komunan malamikon okcidenten forpereis ses mil gejunuloj. La sango devas ligi rusojn kaj polojn kaj reciprokigi ilin per la amikeco kaj amo. El la historio oni menciu la fakton, ke la Nigra Madono el Ĉenstoĥovo iris al Polujo ĝuste tra Ruslando. Tie ankaŭ laboris polaj martiroj, sankta Jozefato Kuncewicz, mortigita en Janovo (1657). Ĉio ĉi igas polojn esperi, ke la du najbaraj nacioj vivos pace kaj amikece. En Ukrainio kaj en Litovio poloj havas karajn memoraĵojn – en Lvovo kaj en Vilno. En la lasta famas la Akra Pordego „Ostra Brama“ kun la gracodona Mariabildo pentrita en Krakovo kaj la tombo

de sankta Kazimiro Reĝido. De Litovio poloj ricevis bonegan reĝon Ladislavon Jagiello kaj Polujo reciprokis al litovanoj per kristanismo.

Sufiĉe vastaj rilatoj ligas polojn kun Francio. En la 18-a jarcento poloj donis al Francujo reĝinon Maria-Karolina, edzinon por Ludoviko la 15-a kaj reciproke la francoj akceptis gaste polan forpelitan reĝon Stanislavon Leszczyński, kiu mortis kiel princo de Lotaringio (1736) kaj ripozas en Bonsecours ĉe Nancy. Dum la pola pli ol 120 jarojn daŭranta dispartigo poloj kune kun francoj batalis malfeliĉe sub imperiestro Napoleono Bonaparte, esperante je renaskiĝo de Polujo. Post la malvenko multaj polaj elmigrintoj trovis rifuĝejon en Francio, same kiel post la unua kaj dua mondmilitoj.



*Kardinalo sankta Stanisław Kostka*

Kun Aŭstrio poloj havis malbonajn kaj ankaŭ bonajn rilatojn. Al la lastaj oni devas alkalkuli defendon de Vieno kontraŭ turkoj fare de la pola reĝo Johano Sobieski (1683). Sur monto Kahlenberg apud Vieno, de kie Sobieski estris la batalon, hodiaŭ situas pola preĝejo, sanktejo de ambaŭ nacioj. Vieno reciprokis al poloj per juna heroo, dekokjaraĝa, kiu estis sol-




*Tombo de 18-jara soldato Otto Schimeck*

dato de la hitlera armeo – Otto Schimeck. Li ricevis ordonon dispafi grupon da polaj vilaĝanoj, inter kiuj ĉefe estis infanoj. Tion li rifuzis pro la religia kialo, malgraŭ klara minaco de propra morto: “Mi estas katoliko kaj mi neniam pafos kontraŭ la senkulpuloj”. Surbaze de speciala ordono el Berlino li estis pafmortigita en Machowa. Sur lia tombo ĉiam kuŝas freŝaj floroj. Ankaŭ ambaŭ naciojn ligas beata M. Teresa Ledóchowska, polino loĝanta kaj misie laboranta en Aŭstrio.

Kun Italio ligas polojn multspecaj kontaktoj, ĉefe la papa sidejo, Romo, altiranta polojn por studi aŭ eklezie labori. Ĉi tiuj postlasis nememoreble multajn memoraĵojn. Romo mem havas ilin tiom, ke oni parolas pri la pola Romo. Tie havas siajn tombojn kardinaloj Hozjusz, sankta Stanisław Kostka kaj M. Teresa Ledóchowska, tie studis sankta Maksimiliano Kolbe. Ankaŭ aliaj urboj, ĉefe la universitataj, abundas per polaj studintoj kaj postsignoj. El la lasta mondmilito postlasis tie du grandaj tombejoj de polaj soldatoj batalantaj por la libereco. Unu sur Monte Cassino kaj la dua en Loreto. Tiuj lokoj ĉiam altiras polajn korojn. La

soldatoj mortis fremdlande, por ke poloj povu vivi en la libera Patrujo.

De pli ol 25 jaroj Pollandon kaj Italion ligas ankoraŭ la pola Papo Johano Paŭlo la Dua, sed pri tiu pontifiko de Granda Sankta Patro Wojtyła certe parolos multaj venontaj generacioj de poloj, italoj kaj nacioj de ĉiuj landoj de la terglobo.

Ankaŭ la malproksima Ameriko estas kara por poloj. Tie polaj herooj – generaloj Kazimiro Pulaski kaj Tadeo Kosciuszko kune kun Vaŝingtono konstruis la Unuiĝintajn Ŝtatojn – Usonon (USA). Tie mortis amaso da polaj elmigrintoj post la pereo de la polŝtata libereco en la 18-a kaj 19-a jarcentoj. Ĝis nun poloj efike kontribuas al bonfarto de tiu amika ŝtato.

Finfine, preskaŭ ne ekzistas lando sur la tero, kie ne vivus poloj, ne batalus por la libereco kaj ne konstruadus la novan vivon. Diversaj historiaj eventoj dispelis la polan nacion en la vastan mondon. Estas la diraĵo, "Kien ajn oni paŝas, ĉie oni surtretas la polajn piedsignojn".



*Generalo Tadeusz Kosciuszko*

Poloj havas la veran motivon, por ami ĉiun nacion, deziri al ĉiuj nacioj bonon kaj pacon kaj laŭeble strebi pri ties realigo.

*Stanisław Śmigielski*

## MALPLENIĜIS PREĜEJOJ, PLENIĜIS MALLIBEREJOJ

Laŭ artikolo aperinta la 10-an de junio 2011 en ĉeĥa gazeto Lidové noviny (Popola gazeto), la malliberejoj estas troŝtopitaj. Ĉiu kvincenta ĉeĥo estas malliberigita. Oni do planas pligrandigi loĝkapaciton de la malliberejoj. Jam antaŭ sesdek jaroj, kiam uzurpis ŝtatpotencon komunistoj persekutantaj la eklezion, oni povis aŭdi proverbon: "Se malpleniĝos preĝejoj, pleniĝos malliberejoj." Jes, ili dum sia regado certe sukcesis realigi tiun ĉi proverbon, sed la nuntempa fuŝita demokratio reganta per liberalismo kaj bazita sur konsumismo kaj ateisma relativismo tiuafere eĉ superis la periodon de la komunista firegado. La citita proverbo do pli ol centprocente nuntempe realiĝas. Do ne tro esperdona estonteco ne nur por nia lando, sed por la tuta Eŭropo, se en ĝi plu regos la nuntempaj malamikoj de la kristanismo, sur kies radikoj Eŭropo elkreskis.

*Miloslav Šváček*


Se iun tagon la homo provos, estu kie ajn, konstrui sian vivon sur ateismo, li kreos ion tiel renversitan, tiel blindecan kaj nehomecan, ke la tuta konstruaĵo ruiniĝos sub ŝarĝo de homaj malbenoj. Revolucio ne estas la plej malbona en tio, kion ĝi detruas, sed en tio, kion ĝi kreas.

*Fjodor Dostojevskij*

# LA FIŜBARKO

Teksto Sac. S. Szmidt

Muziko C. Gabarain




2. Mi estas homo mizera, / nur la koron mi havas bonvolan / kaj manojn pretajn al kunlaboro. Ref.: Sinjoro, jen Vi min ekrigardis ...

3. Vi miajn manojn bezonas, / mian koron junece fervoran, / ŝvitgutojn miajn, solecon mian. Ref.: Sinjoro, jen Vi min ekrigardis ...

4. Nun ni jam kune ekiros, / kapti korojn sur hom-oceano, / per ret´ de l´ Vero kaj Vivo-Vorto! Ref.: Sinjoro, jen Vi min ekrigardis ...

## POR ENPENSIĜO

Satano kunvokis tutmondan kolektiĝon de demonoj. En sia enkonduka alparolo li diris:

„Ni ne povas al la kristanoj malebligi, ke ili vizitadu preĝejon. Ni ne povas malebligi al ili, ke ili legu Biblion kaj ekkonadu la veron. Eĉ ni ne povas malebligi al ili en tio, ke ili ekligu intiman rilaton kun sia Savinto. Ni lasu ilin, ke ili vizitadu preĝejon. Sed ni senigu ilin pri la tempo, por ke ili ne havu la eblecon kreadi sian rilaton al Jesuo Kristo. Ĝuste tion mi de vi volas“, diris diablo. „Malhelpu al ili, ke ili estu en kunligo kun sia Savinto kaj dum la tuta tago konservu la vivodonan interligon!“

„Kaj kiel ni tion faru?, demandis liaj demonoj.

„Klopodu, ke ili estus senĉese okupataj per negravaj aferoj kaj elpensu multe da eblecoj, kiel okupi ilian menson,“ respondis diablo.

„Tentadu ilin, ke ili malŝparu, elspezu kaj elspezu kaj prunteprenadu la monon. Konvinkigu iliajn virinojn, ke ili vizitadu laborejon kaj pasigadu tie multe da tempo, kaj ke la viroj laboru ses ĝis sep tagojn ensemajne, dek ĝis dek du horojn ĉiutage, por ke ili ne povu permesi al si vivi malplenan vivon. Malhelpu ilin pasigi la tempon kun infanoj. Kiam iliaj familioj disfaliĝos, ne plu estos en iliaj familioj manko de la laborstreso! Konstante ataku ilian meson, por ke ili ne aŭdu tiun mallaŭtan, diskretan voĉon. Loginstigu ilin, ke dumvojaĝe ili konstante funkciigu radioaparaton aŭ magnetofonon, ke hejme ili havu konstante funkciantajn televid-apa-ratojn, kompaktdiskilojn kaj komputilojn, kaj estu atentemaj, ke en ĉiu vendejo kaj restoracio konstante ludu la profana muziko. Tio tute okupos ilian menson kaj interrompos ilian kunligon kun Kristo.

Zorgu, ke ili havu sur la tabletoj dum kafotrinkado amason da revuoj kaj gazetoj. Dudek kvar horojn ĉiutage ataku ilian cerbon per raportoj. Dum ŝoforado ilin ĝenu per reklamtabuloj.

Plenigu iliajn retpoŝtajn kestojn per sensencaĵoj, katalogoj de varoj, prognozadoj kaj per diversaj novaĵoj kaj ofertoj de prezreduktoj kaj produktaĵoj, senpagaj servoj kaj falsaj esperoj.

En gazetoj, revuoj kaj en televido konstante prezentadu sveltajn belajn modelulinojn, por ke la viroj ekkredu, ke la plej grava estas ekstera beleco kaj ke ili komencu esti malkontentaj pri siaj edzinoj.

Klopodu, ke la edzinoj estu tro lacaj, ol ke ili povu ennokte ami siajn virojn. Aldonu al ili al tio ankaŭ kapdoloron! Se ili ne donos al siaj edzoj la bezonatan amon, ili komencos ĝin serĉi aliloke. Tio rapide disfaligos iliajn familiojn.

Donu al ili Santa Claus-on, por ilin forkonduki de ekspliko de la ĝusta senco de Kristnasko al siaj infanoj. Donu al ili paskan leporeton, por ke ili ne parolu pri Lia resurekto kaj potenco kontraŭ la peko kaj la morto.

Konduku ilin ankaŭ al tio, ke ili estu malmoderaj ankaŭ dum la ripozado. Strebu, ke ili el ripozferiadoj revenadu elĉerpitaj. Okupadu ilin, ke ili ne havu la tempon iri en la naturon kaj mediti pri la Dia kreitaĵaro. Anstataŭ tio sendadu ilin al amuzaj parkoj, sportaj aranĝoj, ludejoj, koncertoj kaj en la kinejon.

Precipe ilin konstante okupadu!

Kaj se ili kolektiĝos por la spirita komuneco, sugestu al ili, ke ili ĝin plenigu per vantaj paroloj kaj sensencaj babiladoj, por ke ili hejmen revenu kun ŝarĝita konscienco.

Plenigu iliajn vivojn per multe da bonaj objektoj, por ke ili ne havu la tempon ĉerpi la forton ĉe Jesuo. Tiel ili estos preskaŭ por ĉio solaj kaj pro tiuj bonaj aĵoj ili oferos sian sanon kaj familion.

TIO EFIKOS! Tio funkcios! Tio do

estas la plano!“

Demonoj fervore ekagadis kaj klopodadis, ke la kristanoj estu ĉiam pli kaj pli okupataj kaj instigataj kaj ke ili kostante kuradu tien kaj reen, ke ili ne havu la tempon por sia Dio kaj siaj familioj, ke ili ne havu la tempon rakonti al la aliuloj, ke Jesuo havas la potencon ŝanĝi ilian vivon.

Ĉu la diablo sukcesis en tiu ĉi plano? Juĝu mem! Ĉu signifas esti konstante „OKUPATA“, esti sklavo de la diablo?

Se vi ne estas tro okupata, legigu tion al la aliuloj. *(Aŭtoro nekonata)*

## KRISTNASKA LETERO DE JESUO POR VI

Kiel vi bone scias, mia naskiĝdatreveno proksimiĝas. Ĉiujare okazas soleno omaĝe al mi kaj mi pensas, ke same tio okazos ankaŭ nunjare. Dum tiuj ĉi tagoj multaj homoj aĉetas donacetojn. Radio- kaj televid-stacioj en siaj reklamaj disaŭdigoj sur ĉiu paŝo atentigas la mondon pri la proksimiĝanta mia naskiĝdatreveno.

Estas agrable scii, ke almenaŭ unufoje en la jaro iuj homoj rememoras min.

Kiel vi certe scias, la soleno de mia naskiĝtago komencis jam antaŭ multaj jaroj. Komence la homoj komprenis kaj estis dankemaj por ĉio, kion mi por ili faris. Sed nuntempe jam ne multaj konas veran kaŭzon de tiu ĉi solenado. La familioj kaj geamikoj estas kune, ili amuziĝas, sed ili ne konas sencon de la solenado.

Mi rememoras, ke ankaŭ pasinjrare okazis tiu ĉi soleno miahonore. La festa tablo estis plena da bongustaĵoj, fruktoj kaj bonaĵoj. La dekoracio estis vere grandioza kaj ĉion tion kompletigis belege pakitaj donacetoj. Sed ĉu vi volas ion scii? Mi estis jubileulo, sed mi ne estis invitita.

Kiam komenciĝis tago T, mi venis, sed ili min lasis stari ekstere, antaŭ fermita pordo. Kaj mi tiel sopiregis esti kun ili!

Verdire, ne surprizis min tio, ĉar dum lastaj jaroj multaj homoj antaŭ mi fermas la pordon.

Eĉ se ne invitita, tamen mi decidiĝis senbrue eniri. Mi starigis min en angulon de la ĉambro kaj mi rigardis. Ĉiuj manĝis, trinkis, iuj eĉ ebriiĝis, rakontis obscenajn spritaĵojn kaj treege ili amuziĝis. Subite eniris la ĉambron granda grasdika viro ruĝe vestita kun longa blanka barbo. Ĝi aspektis kiel ebria, li sidiĝis sur la brakseĝon kaj ĉiuj infanoj alkuris al li kriante: „Santa Claus, Santa Claus!“, kvazaŭ tiu ĉi soleno estus je lia honoro!

Duonnokte ĉiuj komencis sin ĉirkaŭbraki. Kaj ĉu vi scias kion? Neniu venis min brakumi. La homoj komencis disdonadi la donacetojn, elpakadis ilin plenaj de surpriza atendado. Kiam jam estis ĉiuj dispakitaj, nekuraĝe mi ekrigardis, ĉu almenaŭ unu tie restis por mi.

Ho, kiel vi vin sentus, se en via naskiĝtago estus ĉiuj pridonacitaj krom vi – la jubileŭlo?

Tiam mi ekkomprenis, ke mi estas nevola, neinvitita, kaj tial mi rapide foriris.

Ĉiujare la festo de mia naskiĝtago pli malboniĝas. La homoj pensas nur pri la manĝo, trinkado, amuziĝo, sed min ili iel forgesas.

Mi ĝojus, se vi en tiu ĉi Kristnasko permesus al mi eniri vian vivon.

Mi ĝojiĝus, se vi rekonus fakton, ke antaŭ pli ol dumil jaroj mi libervole venis en ĉi tiun mondon oferi mian vivon surkruce, por vin savi. Hodiaŭ tion ununuran, kion mi volas, estas, ke vi kredu tion per la tuta via koro.

Mi deziras al vi kaj viaj proksimuloj belan kaj benitan Kristnaskon!

*(Aŭtoro nekonata)*

## PREĜO AL SANKTA PIO LA DEKA


Ho, sankta papo Pio la Deka, bona kaj viglanta paŝtisto, Vi, kiu atingis la gloron de la sanktuloj, aŭskultu la petegon, kiun ni konfide adresas al Vi. Helpu, ke ni konu pli kaj pli bone la Sinjoron Jesuon, kaj ke ni amu Lin profunde tiel, ke ni vivu por Li kaj per Li. Savogardu nin kontraŭ ĉiu malbono de l´ animo kaj de l´ korpo. Helpu nin vivi kiel aŭtentikaj atestantoj de la amo de Dio por la gefratoj. Protektu la tutan Eklezion, nian diocezon, nian paroĥon, la familiojn. Igu, ke ni imitu vian grandan devotecon al la beata Virgulino Maria, nia ĉiela Patrino. Via protekto atingu ankaŭ ĉiujn civilajn instituciojn kaj tiujn, kiuj aktivas en la socia vivo. Igu nin konstantaj agantoj de la paco inter ni kaj en la socio. Amen.



Ho, sankta papo Pio la Deka, bona kaj viglanta paŝtisto, Vi, kiu atingis la gloron de la sanktuloj, aŭskultu la petegon, kiun ni prezentas ĉe viaj piedoj. Akiru por ni la veran amon al Jesuo tiel, ke ni vivu nur en Li! Ni preĝpetegas por ni vian grandan devotecon al la beata Virgulino Maria, kaj ke ni liberiĝu disde ĉiu malbono de la animo kaj de la korpo! Kaj igu, ke la Eklezio kaj la kristana socio – samkiel Vi tion deziris – kantu la himnon de la venko kaj la paco. Amen.

## LA RIFUĜEJO DE LA PEKULOJ

Tiel kiel la homa okulo ne toleras intensan lumon, ĉar ĝi kaŭzas inflamon, tiel kiel la homa haŭto ne toleras acidon, ĉar ĝi ankaŭ kaŭzas inflamon, tiel same la homa koro, la homa animo ne toleras kulpon. La homo, se li havas iun pekon, havas du eblecojn, kiel trakti ĝin.



Aŭ mi ĝin enpuŝos en min, ankoraŭ pli profunden el mia konscio en mian subkonscion, aŭ la kulpon mi ĵetos ekster en. Estas tio eble same kiel kun forfalaĵo. Aŭ mi ĝin ien piedpuŝos en la ĉambro, por ke ĝi ne estu videbla, sed ĝi tie plu restadas kaj putras, aŭ mi ĵetos ĝin en la balaaĵujon kaj mi definitive libe-rigos min de ĝi.

La homo de la komenco de la 21-a jarcento tre malmulton scias, kiel senigi sin de la kulpo, ĉar li ne konas rifuĝejon, kien iri kun tio, kio estas por la homa koro fremda, do li la kulpojn subpremas en sin. Kaj la subpremita kulpo kondukas al la malsano. En psiĥiatrio ni diras al ĝi *auxieta*, anksieco, depresio aŭ agreseco.

La agreseco estas vere sekvo de la nesolvita kulpo el pasinto. Havi kien iri kun la kulpo, havi kien iri kun la peko, tio estas grandega ŝanco, kiun la homo ricevadas de Dio. Se la homo faris ion malbonan, do li havas du eblecojn. Aŭ li de tiu problemo forkuras aŭ kun tiu problemo li iras al la Patro. Ni ekmemoru, kion faris Adamo, kiam li pekis. Li sin kaŝis. Kaj tio estas la baza psiĥologia eraro. Li forkuris antaŭ Tiu, kiu estas justa. Li forkuris en la kaŝejon. Kaj kiam lin la Eternulo kvazaŭ simbole serĉas, ĉar la Eternulo ĉiam serĉas nur simbole, ĉar Li scias, kie estis la unua homo kaŝita, do Adamo estas kaŝita. Sed ni, la kristanoj, havas la eblecon iri al la Patro, por ke estu pardonite al ni kaj ni ne plu devas timi, ĉar por tio ni ankoraŭ havas la rifuĝejon de la pekuloj, kiu nin ne kaŝas antaŭ Dio, sed portas nin al Dio. La Virgulino Maria estas tiu pozitiva rifuĝejo.

*D-ro Max Kašparů*

## KORAN GRATULON AL NIA IKUE-FRATO MAX

Doc. ThDr. MUDr. Mgr. Jaroslav Maxmilián Kašparů, Ph naskiĝis en la urbeto Žirovnice en Bohemia-Moravia Montetaro, Ĉeĥio. Post abiturienta ekzameno li finis studadon de stomatologio en Medicinista Fakultato de Universitato de Karolo en Prago, ĝeneralan medicinon en Medicinista fakultato de Komenio en Bratislava, pedagogion kaj etikon en České Budějovice kaj katolikan teologion en Teologia Instituto de Cirilometodia Teologia Fakultato en Badín.

Dum studado en praga kuracista fakultato li konvertas al katolika kredo kaj en la jaro 1984 li sekrete eniras Sekularan Ordenon de Premonstratoj en Želiv, akceptante la ordenan nomon Maxmilián. En 1990 li iĝis konstanta diakono. En la jaro 1997 li fondis privatan centrejon Norbertinum en Pelhřimov, kie li praktikas psikiatrian fakon. En la jaro 2007 li iĝis docento de pastorala teologio. Li estas aŭtoro de multaj artikoloj, libroj kaj agadas en radio- kaj televid-elsendoj. Liaj hobioj estas, krom Esperanto, ankaŭ teatraj roloj. Li estas edziĝinta, patro de du filinoj kaj komitatano de la Ĉeĥa



***Merkrede la 28-an de septembro 2011 transprenis titolon de honora doktoreco el la manoj de rektoro de Akademio de Sankta Elizabeta en Bratislava frato Max Kašparů, por kultura, pedagogia, spirita kaj medicinista aktivadoj en Slovakio. Koran gratulon!***

## MOVADAJ INFORMOJ

### EN LA INTERRETO

**ESPERANTO EN LA OFICIALA JUTUBA-KANALO DE VATIKANO**. Je la adresoj http://www.youtube.com/user/vaticanit#p/a/f/0/mRi_QVBR81w aŭ http://www.youtube.com/watch?v=mRi_QVBR81w oni povas spekti la filmon de la Kristnaska Mesaĝo 2011 de Papo Benedikto la 16a. Se oni alklakas la ruĝan butonon CC, oni povas elekti la subtekstadon en Esperanto. Je minutoj 19,20 oni povas aŭdi la Papon, kiu salutas en E-o kaj vidi la esperantistojn kiuj levas siajn panelojn.

**INTERNACIA KUNPREĜADO EN ESPERANTO**. Dank' al modernaj teknologioj, grupo de gefratoj ariĝas pere de Skajpo por kune preĝi. Por partopreni, oni aldonu la Skajp-konton vitor.luiz.pedro al la listo de geamikoj ĉe Skajpo, kaj oni konektiĝu al Skajpo je la horo indikita en la invitmesaĝo, kiu aperas i.a. en la dissendolisto de IKUE ikue@yahoogroups.com. La kunpreĝado, malfermita al alikonfesiaj kristanoj, okazas ekde la fino de decembro 2010 per Skajpo. Komentoj kaj sugestoj estas bonvenaj. *(informis: Vitor Luiz - www.vitorluiz.6te.net. El Interreto)*.

**WWW.RADIO-VATIKANA-ESPERANTO.ORG** estas la arkivo de la E-elsendoj de Radio Vatikana. Ĝis la 31a de decembro 2011 estas tie enkarkivigitaj 1090 elsendoj, ekde - kun mankoj - majo 2004.

**BIBLIO LEGATA**. Je la komenco de la jaro 2011 samideano Caviness decidis laŭtlegi (iom post iom) la Biblion en Esperanto. Li faris al si ĉi tiun demandon: "En la reto troveblas sondosieroj de la Biblio en multaj lingvoj, kial ne ankaŭ en Esperanto?". Li ekaboris kaj nuntempe jam 13 personoj kontribuas al la projekto. Ĉiu legas laŭvole kiam li havas tempon. La progreso ne estas rapidega, sed ĝi progresas: 33% el la bibliaj ĉapitroj estas jam legitaj, kun la celo havi la tutan Biblion en sondosieroj rete disponeblaj. Oni invitas kunlabori: klarigoj estas ĉe http://personal.southern.edu/~caviness/Audebla Biblio - Kion fari.htm. Por aŭsklti la Biblion en Esperanto: http://audioboo.fm/kenetoj *(informis: Ken Caviness (Keneto) Tennessee, Usono, Inicianto de la projekto "Aŭdebla Biblio". El Interreto).*

## EVENTOJ



**ESPERANTISTOJ EN PLACO SANKTA PETRO.** Samkiel dum la antaŭaj papaj benoj Urbi et Orbi, ankaŭ Kristnaske de 2011 ripetiĝis la E-lingva bondeziro de la Papo: "Dibenitan Kristnaskon kaj prosperan novjaron!". Kaj denove grupo de esperantistoj ĉeestis en Vatikano kun siaj paneloj, kiuj konsistigas la vorton "Esperanto". La iniciato estis gvidata, kiel tradicie, de la itala samideano Giovanni Conti. Antaŭ la apero de la Papo en la centra loĝio de la Baziliko, la itala televido montris frontlinie la panelojn kaj la raportisto de la itala elsendo diris: "Unu el la lingvoj, kiujn la Papo uzos por diri siajn bondezirojn estos Esperanto, kiu estas la lingvo...". Poste li ŝanĝis temon por anonci la aperon de la Papo. Ĉiuokaze la panelojn oni remontris dum la elsendo plurfoje, aparte dum la E-lingva saluto de la Papo. Multaj ĉeestantoj volis esti fotitaj antaŭ la paneloj. Ĉi-foje okazis interesa renkonto. En la apuda fotografio estas kun (de maldekstre) Antonio De Cristofaro kaj Giovanni Daminelli, gvatemaliano (lasta dekstre), nun studento en Madrido. Li lernetis Esperanton, sed li perdis kontaktojn post forlaso de Gvatemalio kaj ne plu rilatis al Esperanto. Li estis tre surprizita kaj kontenta aŭskulti la papan bondeziron en E-o kaj renkonti la esperantistojn.



**TRI ESPERANTAJ JUBILEOJ EN DIOCEZO SPEYER.** La 23an de oktobro 2011 la Laborunuiĝo de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) en diocezo Speyer festis per diservo en la Afra-kapelo de la katedralo kaj solenaĵo en la najbara Friedrich-Spee-domo samtempe tri jubileojn. Unue: Antaŭ dudek jaroj la sacerdoto Albrecht Kronenberger invitis al la unua esperantlingva diservo en la Afra-kapelon de la katedralo en Speyer. De tiam ĝis hodiaŭ celebriĝis pojare kvin tiaj mesoj samaloke. Due: Iom pli poste fondiĝis la laborunuiĝo kun la celo realigi komunan religian vivon baze de du kulturoj, nome de la Kristaneco kaj de la Esperantaneco. Ĝis hodiaŭ aliĝis 365 personoj - ĉu aktive, ĉu subtene - al tiu ĉi de la diocezo agnoskita asocio. La tria festinda dato estis la apero de la ekumena kanto- kaj preĝolibro ADORU antaŭ dek jaroj, al kies ekzisto pastro Kronenberger konsiderinde kontribuis. Rita Rössler-Buckel, la aktuala prezidantino de la asocio, dankis dum la festkunveno al siaj antaŭuloj Manfred Ritthaler, Helmut Rössler (neparenca) kaj Anton Kiefer (kiu malavare ankaŭ tiuokaze regalis la ĉeestantojn per sia altkvalita «Esperantovino»). Mallonge ŝi memorigis la agadon de la asocio: Apud la regulaj mesoj en la katedralo de Speyer ŝi menciis interalie la paskonoktajn mesojn en la pilgrima kapelo de Maria Rosenberg («rozomonto»), la informostandojn dum la diocezaj «Katolikaj tagoj», la MES-aranĝojn en la apudmozela Marienburg, la diservojn en aliaj Esperanto-kunvenoj kaj, tute aktuale, la interretan portalon «Kristanaj fontoj». Al la diservo kaj la solenaĵo muzike kontribuis flutogrupo de la regiona popola altlernejo kaj la ensemblo «Spira spiralo». La laborunuiĝo ankaŭ estonte volas kontribui, ke homoj en komuna lingvo, en la lingvo de d-ro Zamenhof, renkontiĝu, kompreniĝu kaj preĝu transe de limoj landaj, kulturaj kaj religiaj.

**Franz-Georg RÖSSLER**



*En la fotografio: post la jubilea diservo en la Afra-kapelo*